



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista. 3 FF.
 Unujara abono kun adresaro : 18 FF ĝirotaj al la poŝtkonto
 n° 3 371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :
 Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROCHE TIMBAUT

Kiel ĝi naskiĝas

Responde al peto de amikino Nicole en L! 46, jen la unua artikolo el serio celanta komprenigi al la Laŭtularo, kiel naskiĝas numero de "Laŭte!". Al tiuj, kiuj jam mem eldonas periodaĵon, mi pardonpetas ; ankaŭ al tiuj, kiujn riskas tedi la priskribaĵo. Mi esperas nur ke tiu artikolserio ne fortimigu la bonvolojn, sed ke male venos kelkaj sugestoj de elturniĝemul(in)oj por plifaciligi la eldontaskaron.

LA REDAKTADO

Skeme, de la legantaro/abonantaro venas "kruda materialo (artikoloj, foje desegnoj), kiun la redaktanto (red) devas ekzameni, espereble kompreni, preskaŭ ĉiam lingve korekti, antaŭ ol tajpi. La tekstoj devas esti gramatike korektaj kaj kompreneblaj al ĉiu posedanto de PV/PIV. Neologismoj devus akompani piednoto aŭ klarigo en la teksto mem, ĉu ne ? La redaktanto ne ĉion scias. Li devas (us) sisteme kontroli en PV/PIV tion, pri kio li ne estas certa. Ekzemple, ĉu tiu verbo estas transitiva aŭ netransitiva ? Ĉu tiu frazturno ne estas idiotismo de iuj nekomprenbla ? Ĉu tiu vorto estas korekte uzata ? La lingvon la red. se necese korektu laŭ siaj kapabloj, sed respektante la ideojn : korekti la idiotismojn, ne la idiotaĵojn ! Ĉar kiu idioto povus konscii pri idiotaĵoj ? Tial estas nebonvenaj la tekstoj tradukitaj.

La red. ne povas certi, ke la tradukinto ne perfidis la originalon. La red. ja ne disponas pri la originala teksto, kaj krome - se temas pri mi - ne scipovas fremdajn lingvojn. Ofte reaperas similaj eraroj, kaj por jam malnova red. la kontrolado povas aspekti rutina, sed foje estas necesa longa cerbumado, ne ĉiam sukcesa. Imagu, se la red. devas tiam peti klarigojn de la verkinto! (elspezo, tempoperdo!...) Do, verku, verkadu, sed kompatu la red. : mem kontrolu viajn tekstojn antaŭ ol sendi ilin, tio estas maniero mem perfektigi kaj helpi al "Laŭte!" !

LA ENPAĜIGO

Antaŭ ol ektaĵi la red. devas "enpaĝigi", t.e. kalkuli laŭ la proksimuma longeco de la teksto kien ĝin plej trafe loki. Atentu, estu sufiĉa marĝeno, ĉar poste necesos tranĉi ! Se estas akompana desegno, tiu ĉi troviĝu en taŭga loko. Praktike, pro la fakto, ke nun mi uzas ofsetteknikon (per stenciloj la afero estas tute alia), antaŭ ol ektaĵi sur la ofsetplako mi devas esti jam kopifotinta la titolon kaj eventuale la desegnojn. Necesas do prepari sur ordinara blanka folio A4 (210x297) la titolojn (per tutpretaj glueblaj literoj) kaj la desegnojn tie, kie ili troviĝos sur la plako. Mi uzas kopiilon ebligantan foti sur la ofsetplakoj. La manipulado de tiu aparato estas simpla. Estas nur kelkaj zorgetoj : ke estu sufiĉe varme, ke la modelo estu bone lokita...

LA TAJPADO

Do nun okazas la tajpado, dum kiu praktike mi rekontrolas la lingvon, ĉar estas tre malfacile korekti, kiam oni faris tajperaron aŭ lasis eraron en la tajpita teksto. Por tajpi sur ofsetplakoj necesas uzi plastan rubandon, ne la inkumitan. Tiajn rubandojn oni povas uzi nur unu fojon por plakoj, kaj ili estas iom kostaj... Tial mi eluzas ilin poste por tajpi leterojn aŭ ion ajn sur ordinara papero. Konstantan ŝparemon, eĉ avaron devas flegi la eldonanto de L! : L! devas resti kiel eble plej malmulte kosta !

Tamen povas erari eĉ lerta tajpanto (mi mem neniam lernis daktilografadon, mi tajpas per nur 2 fingroj). Kiel korekti sur ofsetplako ? Provu molan skrapgumon aŭ razklingon, sed singardeme ! Se vi tro skrapos, vi
(daŭrigo p.35)

NIA DEBATO :

la modo

(13a temo pri traktita per ĉenleteroj)



La enkonduko de Suzana

Unuavide oni pensas pri komerco ; ĉiam ĝi estis komercaĵo, nia konsumsocio pli evidentigas tion : pli kaj pli ĝi ŝanĝiĝas, la vestkudrado estas malzorgata, la ŝtofoj malpli rezistemaj.

Pri "Modo" ĝenerale, oni pensas pri ina modo, kvankam de post la lasta mondmilito vira modo fariĝas pli grava.

Iuj sin demandas : kial tiel ofte ŝanĝi la vestmodon, eĉ, kial sin vesti ? Oni povus konsideri, ke nenian ŝirmilon kontraŭ la malvarmo aŭ varmo la naturo donis al la homo. Mi opinias, ke la homo ne bone eltenus la vintron, eĉ en moderaj klimatoj.

Se eblus nenian veston surhavi, mi opinias, ke estus teda spektaklo pro sia samaspekteco kaj ankaŭ pro sia malbeleco. La Adonis kaj Venera-j, kiam ili ekzistas, ne povas longe konservi sian belecon... La vestoj ebligas la diversecon.

Oni sin vestas por plaĉe aspekti al ĉiuj ; kiam oni estas gejunuloj, la malsamaj seksuloj estas pli koncernataj (inter ĉiuj). Tamen, je ĉiu aĝo, oni sin vestas por sin plezurigi.

En tia kampo enmiksiĝas la virokrata kriterio, per modgazetoj, kiu atentigas la virinon pri iuj ŝiaj korpopartoj, asertante, ke ŝi estos pli alloga al la viro. Tiel ŝi fariĝas seksa objekto, ties nura rolo en virokrata sociordo. Tamen, mi opinias, ke, ĝenerale, la virino adoptis - ekzemple, mamzonon - ĉar la "Modo" rimarkigis al ŝi, ke robo pli belaspektas, kiam oni surmetas iajn subvestojn...

Kiam mi estis 24-jara, mi konsideris ĉefe la plaĉan aspekton de la vesto adoptinta la mamzonon.

Mi ĵus aŭdis, dum radio-dissendo, ke dum Mezepoko kaj Renesanco oni ne tre atentis pri la vestoj ; eĉ la viroj surmetis robojn. Pro la uzo de delikataj silkaj ŝtofoj, punktoj multekostaj, nur la riĉuloj ilin aĉetis, tiam la Modo fariĝis klasa modo. Dume oni kreis apartajn vestojn laŭ la sekso. Tamen mi rimarkis en la mezepoka filmo "Martin Guerre", ke iuj viroj surmetis seksŝirmilon. Do, laŭ renesanca modo la virinoj surmetis decajn vestojn ; malgraŭ tia regulo en riĉa medio malpli rigore oni ĝin sekvis.

Kompreneble, la evoluado de la vivmaniero multe influas la Modon ; tio estas pli videbla en nia epoko : la propra aŭtomobilo, la kampadismo, igas multajn homojn surmeti sportajn vestojn aŭ oportunajn, simplajn vestojn, des pli ke inter la ekveturo kaj la alveno nenia kontakto kun aliaj homoj okazos. Tial ili ne zorge sin vestas. Sociaj eventoj naskas strangajn vestmanierojn, ĉu pro reago kontraŭ la cirkonstancaro, ĉu pro ŝanĝo de reĝimo. Nuntempe tiaj reagoj floras.

Iuj modreguloj fariĝas trudo al la virino, ekzemple, nun la virino estu fadenforma, kio havigas malfacilaĵojn al tiuj, kiuj ne estas tiaj. Malfacile ili trovas konvenan veston, temas pri konfekcia vesto.

Suzana.

Sugestoj de Kribo

Estas strange, ke Suzana pritraktis nur la vest-modon. Eble tial, ke, en Francio, kiam oni diras "la modo" oni aludas preskaŭ ekskluzive pri la maniero sin vesti ! Kio influas do la vestmodon ? Ĉu ne la evoluo de la ideoj, de la vivniveloj, de la vivmanieroj, eble ankaŭ la internaciaj rilatoj, kaj, kial ne, la fantaziero de la "modistoj" ? Ĉu vestmodo estas vere nur komerca afero, ĉu nur afero de virinoj, aŭ ĉu pli vaste, simbolo signanta epokon, politikan, ideologian sintenon ? Ni pensu pri la seksa simbolismo (bruligo de mamzonoj fare de feministinoj, longaj haroj...), la ideologia (ekz-e, per sia vestmaniero iuj volas montri sian ribelmon kontraŭ la konsumsocio, aŭ sian ĝeneralan spiritostaton : punk-modo, ktp).

Sed modo trafas ankaŭ alion ol la vestmanieron kaj la longecon de l'hararo : ja preskaŭ ĉiujn ĉiutagajn objektojn,

la muzikon kaj eĉ la vortprovizon ! Tiel furoras "sezonaj" slangoj, vortaj pedantaĵoj disvastiĝantaj en apartaj medioj (ekzemple, ĉe studentoj) aŭ per la amaskomunikiloj.

Alia pritraktenda aspekto estas, laŭ mi, la rolo de la homa ŝafigemo. Aŭ komforte sekvi la modon aŭ "reagi" kontraŭ ĝi, kio estas alia maniero dependi de ĝi.

Ĉion ĉi eble estus bone pli detale pritrakti.

Kribo.

Kun Lilia, vojaĝeto de simio al...esperanto

Ni parolu serioze : simiecaj trajtoj ĉe la simiaro (ho, pardonu la eraron :) ĉe la homaro.

Do, laŭdire, la homo estas esence sociema animalo, t.e., li vivas meze de aliuloj kaj provas tion fari kiom eble plej kontentige. Aldone, li konscias pri sia inteligenteco kaj provas ĝin disvolvi (konsekvence, ĝin ELMONTRI) per siaj tutaj fortoj. Rezulte, li klopodas naĝi meze de la plaĉaj, pacaj, stagnantaj akvoj de la ĝenerala apogo kaj aprobo far siaj samuloj, kaj samtempe regrimpi la akvofalon, kiu baras al li la vojon al brila socia pozicio, supereco, aŭtoritato - ĉar, malgraŭ la kontraŭdiro, ankaŭ tion la sociordo atendas de li, aŭ almenaŭ permesas, ke li tion kredu.

Suzana, vi meritas miajn aplaŭdojn pro via tute...ni diru, "natura" sinteno : vi simple dezirus "plaĉe aspekti al ĉiuj" sen forgesi, ke necesas samtempe "plezurigi vin". Sed, ho ve! mi supozas, ke vi suferegas pro via malebleco fariĝu fadenlinia kaj pro la ĉiumentaj "ŝanĝoj", kvankam vi posedas la kvaliton ami la diversecon, ĉar vin afliktas la ŝabloneco.

Nia kara Kribo, siaflanke, ne fidu al la inteligenteco de la ĉenleterpartoprenantoj kaj tute sekrete provas ŝovi la nazon en fremdan vazon (cetere, tiu sinteno estas vera modo, de kiam ekzistas la klaso de la najbarinoj), alportante brilajn "sugestojn". (Jen, Kribo, se vi vere deziris, ke viaj sugesto-puŝtridentoj restu sekretaj, via plano frakasigis... Kaj mi ne kontraŭas vin nur pro emo al kontraŭo : necesas kontraŭi. Mi esperas, ke tio estas sufiĉe valida argumento). Estu kiel estu, multon trafan enhavas la vorto "ŝafigemo". En Brazilio, oni prefere ne mencias la ŝafojn rilate al modo, ĉar ili estas privata posedaĵo de Dio, la Eternulo. Tamen, oni volonte kaj bonhumore konfesas, ke "kie iras la bovino, tuj malantaŭe sekvas ĝin la bovo" (Jes ja, kia viokrata/virinokrata tutmonda sociordo!).

Sed, subite, la ranohomo eksimias la bovohoman grandon - kaj ni ne serĉu raciajn gvidliniojn ĉe la modomanifestiĝoj : temas, inter aliaj psikologiaj klarigoj, pri la homa simiema fenomeno (pli kaj pli internacie kunligita). Mi, servistino, neniam posedos dommastrinan aspekton, sed mi almenaŭ plenplene apartenu al la klaso de la servistinoj, kies aspekto imitas la dommastrinan. Ho, kiom mal komfortaj, pezaj "jeans" sub tiu ĉi varma tropika suno, sed - kion fari ? - ĉiuj aĉetas "jeans" kaj mi timas esti brulmortigata kiel sorĉistino, se mi agas alimaniere. Al kio utilas ribeliĝi, estu kiu estu la sektoro kontraŭ kiu turniĝas mia rifuzo : finfine, kiel diras la brazilia proverbo, "ĉiu popolo havas la guberniestraron, kiun li meritas."

Konklude, oni estas ŝafoj rilate al la politika, religia, ekonomia, kultura subpremo kaj perforto (subtilaj aŭ videblaj) ; sed antaŭ ĉio, oni estas simioj rilate al modismoj kaj modemoj, kiuj elŝprucas tie kaj jene meze de la ĝenerala sociordo kaj pro tiu ĝenerala sociordo mem. Al ni sufiĉas, ke ni povu sonĝi, ke iam ni fariĝos la reĝo de la simioj (pro tio, ni sekvu la modon de la vetludoj cele al subita riĉiĝo, aŭ ni adoru la film- aŭ televiziheroon, kiu estas, hodiaŭ, en la modo, por pli bone iluziiĝi...). Intertempe, ni saltu de branĉo al branĉo kun la ŝanĝoj de la modo...

La oka mortomerita peko : la malmoderneco.

Mi citu denove Suzanan : "NUNTEMPE tiaj (modaj) reagoj floras" kaj la kernan vorton, kiun flustris Kribo : "la EVOLUO de..."

Ni ja vivas en la epoko de la teknikaj progresoj, kiuj devenas de la homa inteligenteco (ne devigu min ripeti, fojon plian, konceptojn kiel konsumsocio, ekonomikaj kaj politikaj intereso, ktp ktp ktp). La modismoj estas esence HOMA sinteno. En la naturo ĉio, vivanta aŭ ne, ŝanĝiĝas aŭ mutacias ; nur la homo modismemas furore. Ĉio ĉirkaŭ nia civilizita vivo instigas al valorigado de la "ĉiutagaj objektoj" (dankon, Kribo!). La homo ne apartenas plu, en sia ĉiutaga ekzisto, al la universo de la suna sistemo, sed al la progresevoluado de sia tempo, tagon post la alia. Vidu nur la rezulton : la homaro fariĝis tiom elstara, ke la homo estas glutita de la faraĵeroj de la homaro mem ! Ĉiuj valoroj malstabiligiĝas kreante ĉe la individuo profunde enradikitan maltrankvilecon kaj ĉiuspecajn psikologiajn

premojn. La saviĝo situas ĝuste ĉe ŝablona ekstera sinteno, t.e. ĉe la modo, ĉe la gurdemo, kiu ne ĉesas ekzisti dank' al ĝia senĉesa ŝanĝemeco mem kaj limigiteco mem koncerne al tempodaŭro kaj spaco - kvankam ĉiu nova modo-ero estas tiom alloga kaj tiom bone lanĉita, ke ĝi sukcesas involvi homan amason korpe kaj anime, kvazaŭ temus pri dumviva valoraro. Vi, bonŝanculoj loĝantaj en Francio, ne forĵetu la okazon tralegi Ferdydurke (de W. Gombrowicz, trovebla en la kolekto 10/18) kaj vi ĉion komprenos dank'al Zuta, la moderna liceanino.

Kaj ONI estas tiom lertaj, ke ONI eĉ elturniĝas por kapti etajn subgrupojn iel for de la sistemo (ekzemple : la subfosuloj, la ribelemuloj, dekstruloj aŭ maldekstruloj, kleraj, analfabetaj aŭ mistikemaj) en la profitodonaj kaj (laŭeble) sendanĝeraj kurentoj de la moderneco.

Vi sendube ne mortos, se vi ne sekvas la modon(ojn) : verdire, ili ne respondas al la bazaj/nepraj bezonoj de la homo (akvo estas bezono ; Koka-kola estas ja modo, same kiel "novaj markoj" de akvo!). Kelkaj sanofontoj (aŭtentikaj bezonoj) troviĝas ~~en~~ altiritaj meze de modismoj, perdante sian rimarkindan valoron. "Naturaj" nutraĵoj fariĝis modo : oni plej senpriokupiĝe revenos al enskatoligitaj manĝaĵoj, kiam stompiĝos la ondo de naturaĵoj, des pli ke bonkvalitaj kaj senkemiaĵaj manĝaĵoj kostas multe pli... Ekologidefendo fariĝis modo ; evidente estas, ke la mizeraj kampuloj de la sekaj agrokulturaj regionoj de mia lando kapablos neniam eĉ pensi pri instigo al ekologio-defendado kaj reiro al la naturo : se ili havigus al si groŝojn pliajn en la poŝo (ĉar ideoj pliaj en la kapo estas ankoraŭ pli malfacile haveblaj), ili milfoje preferus sekvi la modon de la forkuro al la elektra frenezeco de la modernaj urbegoj, kun "nokta vivo" ktp. Dume, ili kreas kabanajn baptitajn "Diskoteko" meze de la kaktaj kaj de sia malsato. Kaj ne trovu tion trista, absurda aŭ ridinda nur rilate al "simpluloj" : observu la amantojn de la ekologio, kiuj, ĉiun semajnfino, avide serĉas belajn ĉaletojn en arbaroj, por ke la inoj pene promenadu kun siaj altaj kalkanumoj (ha, la modo!) sur la ŝtonoj de vojetoj... Jen la konfirmo pri la strangeco inter la modo kaj la modamatoro, ĉe kiu laco baldaŭ alvenos, eĉ rilate al la naturo, kiun la homo transformas en objekton plian. Kiel oni bone scias, la mondo jam estas perdita, do ni lasu ĝin inter la manoj de Dio...!

Do, ni ne peku kontraŭ la freneza, malhoma, malkonsista statu quo de la modo, ni suferu por inde konsumi ĉion kon-

sumeblan laŭ ĝia apero. SED, se hazarde ni nin sentas sufiĉe kleraj kaj kuraĝaj por ĉion denunci, kion fari, pli-malpli sole, por kontraŭstari la rondoforton de la plejparto sen fali en hitlerismoj aŭ radikalecoj senutilaj? Verŝajne sufiĉus tute simple esti homoj, t.e., konscii kaj konsciigi kiom eble plej...

Kaj se la modo fariĝus tradicio rilate al... Esperanto?!

Ĉu la modo ne preterlasas postsignojn? Ĉerte jes, eĉ se laŭŝajne ĝi komplete malaperas eĉ el la memoro de tiuj, kiuj ĝin travivis. Sen forgesi la bazan kaŭzon: senĉesan "manipuladon" de kelkiuj super la plej multo, ni rimarku, ke la ĉensinsekvo de amerikanoj fariĝas (almenaŭ ĉi tie, en Brazilio, alnomita "la korto de Usono") preskaŭ establita, kultura faktoro. Oni pli kaj pli lernas la anglan lingvon cele al kantado de usonaj muzikoj, oni atendas senpacienco la venontan sensaciaĵan filmon aŭ libron el Usono. Iom post iom, kaj malgraŭ supraĵaj, surfacaj modifoj, la modo povas firmiĝi...

Ĉu vi jam imagis, se Esp-o fariĝus modo? Tio eĉ iomete okazis dum la Kongreso de UEA en Brazilio antaŭ du jaroj: junuloj subite eksciis pri la lingvo kaj volis fariĝi "gravaj" kiel la esperantistoj, aliĝante amase la landajn societojn. Kaj statistikoj pruvas, ke almenaŭ eta procento daŭrigis interesiĝi eĉ kiam forpasis la ondo de entuziasmo naskiĝinta de la cirkonstancoj. Tamen, tamen, tamen... tio irus kontraŭ ĉiuj niaj plej bazaj principoj de klerigado kaj konsciigo. For eĉ la plej minimuma intenco fali en tiom gravan kontraŭdiron: manipuli la homojn por helpi ilin ne esti manipolataj! Malgraŭ ĉio, se la esperanta modo subite alvenus kun simboloj kaj eksteraj signoj ĉie (verdaj steloj, verdaj steloj, verdaj steloj) ni ne mistrafu la okazon por almenaŭ forigi la eksteraĵojn kaj provi transformi ĝin en aŭtentikan kaj sanan, fundamente bezonan kaj alproprigatan valoron.

Lilia.

J.G. : La Modo, ĉu iam liberigilo?

La vest-modo estas nur parto el pli ĝenerala ideo, kiun oni povas difini kiel tendencon sekvi far- aŭ estmanieron dum limigita periodo.

Diversaj estas la faktoroj, kiuj instigas sekvi ian modon: identigo al modelo venanta de gazetaro, kino,

kanzona aŭ muzika medio, ktp, sed ankaŭ disvolviĝo de sporto aŭ ludo praktikata en alia lando: ekz-e vel-tabulo, hulahup, skubiduo, rubikubo kaj nun elektronikaj ludiloj. Ĉerte estas komerca vidpunkto: la inventintoj kaj precipe la vendistoj devas ekspluati la provizoran "vendsektoron", kiun baldaŭ anstataŭos alia. Sed tio ne estas la ununura instigilo de la modo. Ekzistas pluraj aliaj, inter kiuj la ŝafiĝemo de la homoj, kiuj bezonas imiti la vestmanierojn kaj ankaŭ la sintenojn de la homkondukistoj. Tamen ekzistas alia aspekto eble progresema: la ĉe kelkaj homoj bezono je ŝanĝo, kiu instigas ilin inventi novan modon reage al la tradicia. Kiam oni vidas en malnovaj filmoj aŭ fotoj la bankostumojn en 1900, oni diras: feliĉe nun ekzistas alia modo!

En Hispanio sub la faŝisma reĝimo oni mompunis la virinojn, kiuj uzis "bikinojn". Kiuj spite tion sekvis tiun modon, tiuj faris progreseman agadon. Ĉu la unuaj virinoj, kiuj uzis biciklon aŭ aŭtomobilon sekvante la modon de la epoko, ne alportis al siaj ceterulinoj liberig-rimedon?

Sendube, la nova muziko (ĵazo, rok', ktp), la nova pentrarto (abstrakta, poparto) povas esti nur modo por la plimulto de la spektantoj. Kio estas komence nur modo, tio ebligas cetere la evoluon de la esprimmanieroj.

La "Modo" ne estas koncepto tiel simpla, kiel ĝi aspektas unuavide.

J.G.

For la mamzonojn... kaj trinku "Nestlé"! *

La modo estas komerca fenomeno, per kiu oni persvadas klientojn, ke li aŭ ŝi aĉetu varon, kiun ĝi efektive ne bezonas.

Tial la modo aperas samtempe kiel la kliento. Dum la regado de Ludoviko la 14a en Francio, ne la kamparanoj surmetis perukojn por plugi la kampojn. En tiu tempo, la modo koncernis nur la nobelulojn. Pro sia riĉiĝo la burĝoj pli kaj pli imitis la nobelulojn, kaj pri ili mokas Moliero en "La burĝo ĝentilhomino". Tial, kiam aperis la Franca Revolucio, estis protesto ankaŭ kontraŭ la modo: la veraj revoluciuloj estis "senkulotuloj", kaj kelkaj imagis vesti, unuflanke ĉiujn knabojn, aliflanke ĉiujn knabinojn, per la samaj vestoj. Ĝojinde, tiu egaligema ideo ne efektiviĝis. Se ĝi efektiviĝus, la ĝenaboj en uniformoj verŝajne ne plaĉus pli al Suzana, ol la ĝenerala nudeco.

(daŭrigo p.11)

* tiun aĉan titolon kulpas ne Jakelino, sed la red.!

M O D - P I K I L O J

1. La modo estas pruvo de l'Darvina teorio,
ke la Homo devenas de l'Simio.
2. Pli bone ludi arlekenon,
ol simi(1)umi manekenon.
3. Kiun la Modo imponas,
tiun la Moder' ne konas.
4. La Modo l'kreinton riĉigas,
do ĝili la Modon fruktigas.
5. Ne plu l'pavino koncipus iam idon,
se ĝia beluĉ' obeus la modon.

Ĝiz el Lamark

Niaj "ĉenleteroj"

"Eble al mi interesus partopreni al la leterĉeno...se mi scius kiel ĝi funkcias!" - Jen la trafa rimarkigo de nova laŭtulino, kiun la red. strebis dungli. Ho jes, nur iuj iamaj legantoj de "LJP" povas ja memori pri kio temas! Nu, jen skize kiel "tio" funkcias :

- Iu verkas enkondukon pri laŭplaĉa temo kaj sendas ĝin al la red. de "Laŭte!", kiu multobligas ĝin.
- Ĉiu kopio cirkulos inter 3-4 gelaŭtuloj (rondo).
- La ĉenleterano disponas pri ĉ. 10 tagoj por pritrakti la temon, laŭplaĉe respondante al jam verkitaj kontribuoj, antaŭ ol sendi la propran kune kun la antaŭaj al la adreso sekvanta lian/ŝian en la akompananta listo.
- Fine, la tuta "materialo" trafas la red. de "Laŭte", kiu publikigas ĝin...

Ne tre originala korespondsistemo, ruza maniero verkigi gelaŭtulojn (ja ne nur tiujn, kiuj estas ĉenleteranoj, sed ankaŭ la ceterajn legantojn instigatajn per tio, kion ili legas sub la rubriktitolo "Debato"),... jes, jes, vi pravas. Sed ĝis nun tre sukcesa. Ne pli ol 4 leteraj "puntaskoj" jare. Ebleco rezigni ĉiumomente (tiam informu la red.!). Miksado de la partoprenantoj je ĉiu temo. Ni petas bonvolul(in)ojn, prefere ne el Francio, por senĉese renovigi la inspirofonton!

Venonta temo : "Kiel aktivi por plu agiti?". Sendado en aprilo '83. Kribo.

En la 20a jarcento, pli kaj pli da homoj havas aĉetpovon, kaj tial ili estas trafeblaj de la modo. Tamen ekzistas kelkaj primitivuloj, kiujn ĝi ne atingis. La vintro ne estas ĝenerala fenomeno. En la tropikaj kaj ekvatoraj klimatoj, homoj vivas nude. Mi iam vidis en libro, ke la viroj de iu primitiva tribo (mi ne plu scias kie) estas nudaj, sed surhavas grandajn seksujojn. Ju pli riĉa kaj potenca estas la viro, des pli granda estas lia penisujo. Ĉu tion oni povas nomi modo ? Ĉiukaze, ne temas pri ina modo, ĉar kredeble la virinoj de tiu tribo siaflanke vivas tute nudaj. En la klimatoj, kie ne necesas vestoj, la sekskaŝiloj protektas la penison de la viroj, ĉar tiu parto de la korpo estas la plej facile vundebla. Tiu kutimo havas do racian motivon.

Kiel la modo povas persvadi klienton, ke li ion aĉetu, kion li aŭ ŝi ne bezonas ? Plej ofte, temas pri imitado de iu modelo. Dum la regado de Ludoviko la 14a, la korteganoj de Versajlo imitis la reĝon (laŭdire la peruko aperis, ĉar la reĝo estis tute senhara), kaj la burĝoj imitis la nobelulojn. Nuntempe, la gejunuloj imitas la kantistojn (Sheila estas ne nur kantistino, sed ankaŭ posedanto de vestovendejoj). Kaj la Tria Mondo imitas la grandajn regnojn, ĉefe Usonon.

Kiaj estas la rezultoj de la modo ?

- kelkfoje la varo fariĝas konstanta bezono. Kelkaj ekzemploj : forko, kafo, sukero.
- kelkfoje la varo revenas. Mi memoras, ke, kiam mi estis en elementa lernejo, ni faris "skubidujojn". En tiu tempo, Sacha Distel kantis "Ŝi vendis pomojn, pirojn kaj skubidujojn" (la nefrancoj ne konkludu el tio, ke skubiduo estas frukto. Estas malfacile difini "skubiduo", ĉar ĝia ĉefa trajto estas, ke ĝi tute senutilas, krom, por ke vendistoj povu vendi fadenon por skubiduo). Nun mi konstatas, ke la modo revenis. Eble iam infanoj trovos, ke skubiduo estas necesa elemento de infana kulturo, same kiel la globetoj, la pupoj aŭ la saltkordo. Alia ekzemplo : antaŭ iom da tempo mi donacis al mia nevino la kilton, kiun mi surmetis, kiam mi havis ŝian aĝon.
- kelkfoje modo mortigas. Ekzemple, Nestlé sukcesis persvadi junajn patrinojn de la Tria Mondo, ke ili ĉesigu sian naturan lakton, por nutri siajn infanojn per artefarita lakto. La emo imiti la grandajn potencojn estis tia, ke multaj patrinoj persvadiĝis. Sed, ĉar ili ne disponis pri pura akvo, nek povis sekvi la higienajn zorgojn de la blankul-

inoj, multaj beboj mortis.

- sed modo estas la fonto de arto. La klasika teatro estis siatempe modo : por plaĉi al la reĝo oni imitis la teatron de la antikveco. Eĉ estis precizaj leĝoj pri la maniero verki teatraĵon : la francajn lernantojn de mia generacio tedis la reguloj pri "unu loko, unu tago, unu ago". Viktor Hugo ribelis kontraŭ la klasika arto, kaj kreis la romantikan. Tiel evoluas la arto. Same kiel la vestaĵoj, kiujn ni surhavas, kaj la filmoj, kiujn ni rigardas, la desegnoj de niaj teleroj, la manieroj trakti niajn harojn, ĉio estas arto. La modo ebligas do la evoluon de l'arto.

Pri la vestaĵoj mi ne tre fidele obeas la modon. Antaŭ la modo, mi konsideras la praktikan uzon, kiun mi povos fari per la aĉetota varo. La vestaĵoj devas protekti min kontraŭ la strasburga vintro, aŭ malhelpi, ke mia haŭto ruĝiĝu dum la somero. La ŝuoj devas rezisti al unu horo da marŝado tage. Tial mi aĉetas nek altajn kalkanumojn, nek robojn por nuda dorso. Kiam mi estis knabino, min plagis la ŝtrumpoteniloj kaj la mamzono. Nuntempe la ŝtrumpa pantalono anstataŭas la ŝtrumpotenilojn de mia juneco, kaj mi ne plu surmetas mamzonon (tamen mi ne brulis ĝin publike sur placo!).

Ĉu pri ideoj mi estas pli modema ? Veras, ke homrajtoj estas nun modaĵo (hieraŭ vespere mi vidis regulan elsendon de la televido pri tiu temo), sed mi esperas, ke, kiel la forko aŭ la kafo, tiu modaĵo fariĝos definitiva.

Ĉu Esperanto iam estos modaĵo ? Mi rimarkas, ke ankaŭ pri lingvoj ekzistas modoj. Kiam Zamenhof kreis Esperanton, la moda lingvo estis la franca. Niatempe estas la angla. Nu, neniu el tiuj lingvoj estas facila. Ĉu iam la modo estos lerni Esperanton ? Ĉu iam Esperanto estos tiel furore moda, ke la aktivantoj de la angla lingvo aspektos kiel sendanĝeraj frenezuletoj ? Oni povas revii...

Jakelino.

Pro - aŭ pli trafe, dank'al - abundo de artikoloj, pliaj kontribuoj pri tiu temo aperos en venonta "Laŭte!". Ĝis! Apartan dankon al ĉiuj nefrancaj kontribuantoj (proks. 1/3), kiuj respondis la alvokon de la pasinta numero, kaj faras tiun martan "Laŭte!" riĉa je diverseco.



VORTOJ DE MALJUNULO

valo

K R I M U L O kaj K R I M U L O J
=====

Dum tuta jaro oni ofte parolos al ni pri la Barbie-afero. Bona afero por la gazet-, radio- kaj televid-jurnalisto.

Post 40 jaroj la krimoj de Klaus Barbie estas nek pardonitaj nek forgesitaj, kaj sendube tio estas justa. Probable li adoptos la kutiman defendsistemon de tiaj fiuloj : "Mi ne estas respondeca. Mi nur obeis al miaj superuloj kaj discipline plenumis taskojn de supere ordonitajn." Por militistoj kaj policanoj, tiu rezonado estas plene praviga kaj senkulpiga.

Sed li diris ankaŭ ion pli interesan kaj pli ĝustan, en la aviadilo, kie li estis intervjuata. Li diris : "Oni ĉiam juĝas nur la venkitojn." Kiel vere !

Ĉu prezidento Truman, kiu ordonis ĵeti atombombojn sur Hiroŝimon kaj Nagasakion, estis juĝita ? Ne : li vivis ankoraŭ jarojn en plena trankvileco, daŭre honorata, kaj tre verŝajne kun tute bona konscienco.

Ĉu iuj francaj generaloj, ĉeftorturistoj en Algerio, estis juĝitaj ? Ne. Ili ricevis ordenojn, promociojn, altajn postenojn militistajn aŭ civilajn, ĉiel honorate kaj en plena memkontenteco.

Eĉ plie : en la granda proceso en Nurenbergo, kie estis juĝataj la grandaj ĉefoj de la nazia kliko, ĉu interiliaj juĝantoj mem ne estis kelkaj militkrimuloj, kelkaj kulpuloj pri krimoj kontraŭ la homaro ?

Oni ja diros : la krimoj de la nazioj estis plej grandskalaj kaj superis je hororo ĉiujn aliajn. Eble. Tamen mi flaras en tiuj aferoj fortan odoron de hipokriteco.

Ĉu ne ankaŭ vi ?

Valo.

Maljunulo rakontas :

M A L B O N A

I N F O R M O

En iu epoko mi laboris en tre granda laborejo por ellabori novaĵojn necesajn al la industria mondo. Ekzemple, ĉe aviadiloj, por duobligi rapidecon, plibonigi sekurecon, silentecon, aŭ pligrandigi utilan pezon transportatan, ktp. Tiaj laborejoj estis tre serĉataj de diverslandaj milites-troj.

Ni, la teknikistoj, estis informitaj, ke nek la fremd-landa ĉefgeneralato nek lia edzino (kiu devos noti niajn anglalingvajjn klarigojn) komprenas la francan, por objektoj, kiujn ni montros. En tiu temo oni konas nek amikojn nek mal-amikojn. La nacia fierego estas necesa nur, kiam la popolo devas fari militon, riski sian vivon aŭ sanon, eĉ sian dometon aŭ riĉaĵon. Ĉar mi kaj unu el miaj kamaradoj scipovis la anglan lingvon, nia estro sidlokiis nin ĉe du tabloj apudaj por povi aŭskulti iliajn interdemandojn kaj al ili klarigi niajn avantaĝojn. Mia kamarado scipovis ankoraŭ aliajn lingvojn krom la franca kaj la angla.

En taŭga momento mia kamarado eksplikis sian sukceson kaj la edzino de la ĉefgeneralato notis - por memorigo - diversajn klarigojn.

Antaŭ mia vico doni miajn klarigojn, mia kamarado diris al mi france: "Kun kiom da viroj tiu edzino de la ĉefgeneralato estis enlitiĝinta, por ke ŝia edzo iĝu ESTRO inter tiom da generaloj en lia lando...?"

Tiam la edzino terure ruĝiĝis kaj fortiris sian edzon al alia granddistanca tablo.

Nu, per tiu gesto, ni komprenis, ke ŝi scipovis perfekte nian francan lingvon.

-nn-

L A D E V E N O D E L' F E M I N O

(almenaŭ, laŭ Giz el Lamark...)

Estas evidente, ke "femino" devenas de la latina vorto "fēmīna" (virino, ino), sed kiu la origino de ĉi-lastata? Post longa esplorado mi trovis verŝajnan anteulon (tiel!), tio estas la hindoeŭropan radikon fēm/fam kun la proksimuma signifo ĝenerala "efika voĉo, diro". En Esperanto estas la vorto "famo", tio estas "onidiro" (bedaŭr-

inde ĝi estas efektive efika...). En la antikva greka lingvo mi trovis, ke la diuĉo Apolono estis nomata Sennorta Femo.

Oni povus devenigi la Esp. radikon "fem" rekte de la greka, kun la signifo "tiu, kies voĉo estas efika", kaj ĉu oni ne scias, ke "virina lango buĉas sen sango"? (Zamenhofa proverbo, ne mia!), ke la bebinoj ekparolas ĝenerale pli frue ol la bebuĉoj? Krome: tial, ke Apolono estas la Sennorta Femo, lia ĝemelino Diana, la lun-diino, ne estus la Sennorta Femino? Dum la mezepoko, la virinoj, kiuj gaje festis Dianan kaj, laŭ legendoj, sekvis ŝin flugante en la mokta ĉielo, estis nomataj "bonaj feminoj" aŭ "noktaj fe(m)inoj". Ili estis malavaraj kun tiuj, kiuj akceptis ilin kaj invitis ilin hejme, sed ankaŭ faris fi-serĉojn al la negastamaj, malafablaj personoj. Oni diras, ke ankaŭ Jeanne d'Arc eble estis Bona Femino, aŭ havis ian rilaton kun ili... kaj pro tio oni ŝin bruligis kiel sorĉistinon. Por konkludi, "feminismo"

estus la movado por redoni al la virinoj sian "femecon", sian "voĉon efikan" (ne nur kontraŭ la edzoj sed ankaŭ) en la socio, kulturo, politiko, ktp, ktp.

Kion signifas "feminismo" laŭ vi, kun-Laŭtuloj?

Femu, femu libere!

(ĉu "Laŭte" ne ekzistas ĝuste por tio?)

Kaj kion opinias la ekster-francaj

laŭtuloj? Kial ili malfemas konstante? Malfermu la buŝon, ne restu en la guŝo!

(N.B.: la supraj donitaĵoj estas ĝustaj, mi fantaziis nur la konkludojn, sed eble, kiu scias? eĉ la lastaj entenas ion veran...)

MI ESTAS
LA UNUA
FEMINO



la nubeto dum Pasko

"Panjo, mi iras promeni", diras la nubeto.

"Atentu pri ci, ŝi respondis, kaj cin vestu, ĉar ankoraŭ ne tre varmas. Surmetu cian belan blankan mantelon, hodiaŭ estas festo."

"Atenti pri kio?" demandis al si la nubeto. "En la ĉielo la loĝantoj ne estas multaj! La dikaj nuboj zorgas pri mi kaj la birdoj ankoraŭ ne svarmas." Li do malfermis la pordon sen atenti pri la konsiloj de sia panjo kaj eliris. Li apenaŭ estis for, kiam abundo de ŝetaĵoj lin faligis.

"Ej, kio okazas? Mi scias, ke denove ferias, sed mi ne kredas, ke la aŭtomobiloj vojaĝas en la ĉielo! Kutime ili uzas la surterajn vojojn." Li restariĝis. Li apenaŭ ekstaris, kiam nova ondo impetis sur lin kaj denove lin faligis. Rapide li restariĝis kaj kun kolero atente rigardis tiujn veturilojn flavajn aŭ arĝentkolorajn kun flugiloj.

"Ej, ili similas anĝeletojn kun siaj blankaj flugiloj, sed ne estas tio; ili estas multe pli singardemaj!" Li ĵus forlasis sian pensadon, kiam li aŭdis avertilan bruegon, kiu eksaltigis lin. Li metiĝis flanken. Ĝustatempe, ĉar nova trupo pasis.

"Ha ne, li ekkriis, se oni ne plu povas fari eĉ paŝon sen riski falon, estas klimakso! Mi tuj rehejmeniros por esti trankvila." Rigardante returne, li ekvidis formon, kiu similis al la ĵus lin faligintaj. Ĝi iris tute malrapide al li, kaj la nubeto demandis al si, kion eble ĝi havas tiel malfruante. "Diru al mi, diris la nubeto, kial ci ne estas kun ciaj samgentanoj?"

"Mi estas laca, mi venas de tre malproksime, mi havas ankoraŭ multan irotan vojon kaj mi ne plu estas tre juna."

"Kien do vi iras, demandis kun miro la nubeto?"

"Tre malproksimen, en belan sunplenan landon!"

"Kie ĝi estas, diris la nubeto ĉiam pli mirigita? Kaj kiu ci estas? Delonge mi trairas la ĉielon kaj ankoraŭ neniam vidis iun el cia speco."

"Estas tial, ke ci estas ankoraŭ juna. Ĉiujare ni faras la saman vojaĝon."

"Sed neniu el miaj amikoj ĝis nun parolis al mi pri vi."

"Tamen ci bone nin konas. Matene ni vekas la teron per

(fino p.34)

laŭtaj informoj kaj petoj

ESPERANTO - OAZO : Kampadejo por ferii kaj praktiki esperanton.

Post niaj prelegoj kaj poresperantaj klopodoj en 42 landoj, multaj el la legantoj konas nin tiom bone, ke ili kredas, ke ni ĉiam helpas la disvastigon de Esperanto. Nun ni ŝatus voki vian atenton al la "Esperanto-Oazo". Kampadejo kun spaco por 30 tendoj, kun ruldomoj kaj ĉambroj por lui. Ĝi situas 10 km for de la strando ĉe Gandia kaj 70 km de Valencia (Hispanio). Oni ne aŭdas aŭtomobilojn, vi povas dormi profunde kaj pace. La tereno estas en ebena valo kaj ĉirkaŭita per belaj oranĝarbaroj kaj krudaj montoj.

La temperaturo estas ĉiam bona. La tero, ne tre malmola por tendostiftoj. Sunenergio provizas sufiĉe da varma akvo; necesejoj kaj lavejoj estas tre modernaj kaj puraj. La naĝejo estas kahelita kaj 6x12 granda. Samideano Akiles Sanz intencas enlasi nur esperantistojn kaj iliajn familiojn. Li komencis ĝin antaŭ du jaroj, sed ĝis nun nur malmultaj vizitantoj venis. Sen pli da gastoj, li devos fermi tiun laŭdindan "Esperantio"n.

Plej korszincere mi rekomendas ĝin al ĉiuj esperantistoj, iam ajn dum la jaro. Vi povas eĉ decidi resti tie por ĉiam aŭ dum monatoj aŭ jaroj, aŭ aliĝi al Sanz-kooprativo.

Skribu al li por pliaj informoj kaj vizitu la Oazon, ĉar sen via subteno tiu belega kaj inda feriejo ne plu estos Esperanto-Oazo, sed senesperantista dezerto.

Jim Dimo (Aŭstralio)

Poŝtadreso : Akiles Sanz, Apartado 171, Gandia (Valencia) Hispanio.

La 38a kongreso de SAT-Amikaro okazos la 2an, 3an kaj 4an de Aprilo en SAINT-BRIEUC (Francio). SAINT-BRIEUC estas la ĉefurbo de la departemento "Côtes du Nord" en Bretonio ĉe la marbordo. Krom fakaj kaj ĝeneralaj kunvenoj estos prelego pri Internacia Helpa Servo, distraj vesperoj kun kantistoj, E-filmoj kaj teatraĵoj, ekskursoj, ktp. Ĉiuj interesatoj povas skribi, aŭ al : SAT-Amikaro, 67 av. Gambetta F 75020 PARIS, aŭ al : Jacques PAUL, kasisto de la Organiza

Kongresa Komitato, 19 lotissement du Minerai, F 22210 PLEMET. Por la gesamideanoj, kiuj deziros restadi en la regiono post la Kongreso ekzistas ebleco en "Maison de la Mutualité", 10 bd. Charner, 22000 SAINT BRIEUC, tel: (96)94 00 58, kiun la interesato mem kontaktu. La gastado okazos ne en St Brieuc, sed je 18 km de la kongresurbo, tute proksime de urbo Saint-Quay-Portrieux, do proksime de la marbordo, en mutuala ripoz-hotelo troviĝanta en ETABLES. La potaga kaj popersona pensio (sen trinkaĵo) kostos ĉ. 110 FF. Menciuj, ke vi partoprenos la E-Kongreson de SAT-Amikaro.

 "Mia amiko Vladimir petis min demandi vin, ĉu vi povas sendi al mi kelkajn adresojn de junaj e-istoj (10-12-jaraĝaj) por lia E-rondeto. Kelkaj liaj rondetanoj studas la francan, sed tiuj geknaboj, kiuj studas la germanan kaj anglan, fieras pro siaj korespondligoj kun germanaj kaj anglaj s-anoj. Ili eĉ certas pri neeblo ricevi korespondligojn el via lando, Francio. Bonvolu disbati tiun 'feran' opinion."

Petojn aŭ adresojn oni bonvolu sendi al : Aleksandro KOGAN, por Vladimir, Abonkesto 2, SU-187500 TIĤVIN-CENTRO, USSR.

 PERPIGNAN. - Tri kursoj funkcias ĉiusemajne kun la partopreno de tri profesoroj : S-roj Bénazet, Boumal kaj Llech-Walter ĉe la sidejo de la Kultura esperantista Centro, 72 av. du Général de Gaulle, 66000 PERPIGNAN. Tel(68) 34 22 18. Multaj lernantoj partoprenos la federacian kongreson, kiu okazos en Carcassonne (Aude) la 19an kaj 20an de aprilo 1983.

 La Asocio por Protektado kontraŭ la Jonigaj Radiadoj (APRI) komencis uzi esperanton por internacia komunikado, i.a. por diversaj dokumentoj kaj ankaŭ por redaktado kaj diskonigo de "Universala kodo de scienca deontologio", por la starigo de supernaciaj servoj pri sciencaj decidoj kaj la kreo de universala kortumo. La ĉefa animanto, Jean PIGNERO (pr. Pinjero) estas esperantisto. Ĉiu dokumento ebliganta la prilaboradon de sciencteknika prinuklea terminaro en esperanto estos bonvena. Repago de la sendkostoj okazos per irpk. Ne temas pri korespondpeto (tempo tute mankas) : Jean PIGNERO, APRI, 80 rue des Noyers, Crisenoy, F 77390 VERNEUIL L'ETANG.

 CHAMBERY (Francio) : E-kunvenoj ĉiun mardon je 20H15 en la Junuldomo.

Nia lasta grupkunveno okazis la 22an de februaro en CENON-Palmer. 15 personoj ĉeestis. Ni parolis pri :

- 1) la leĝpropono pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn
 Ni legis leteron de Henri Masson pri kunveno, kiu okazis en Parizo, en la oficejoj de la Nacia Asembleo. Kunvenis André Delehedde, deputito, kiu zorgas pri lingvaj problemoj kaj edukado en la Socialista Partio, Michel Bouchez, sekretario de Socialista Esperantista Grupo en departemento Pas-de-Calais, Roland Grandière, prezidanto de SAT-AMIKARO, profesoro Pierre Janton, Roland Levreaud, vicprezidanto de Franca Instituto de Esperanto kaj H. Masson, ĝenerala sekretario de SAT-AMIKARO. Post sufiĉe longa debato, André Delehedde, je la nomo de la Soc. Partio, diris, ke novbakita leĝpropono pri la lernado de Esperanto en lernejoj (eĉ elementaj) estos prezentata en aprilo 1983. R. Levreaud, kiu ĉeestis nian grupkunvenon, aldonis tre interesajn detalojn pri tiu Pariza laborkunveno. Sed restos al ni laboro ; verŝajne, je la taŭga momento, ni denove devos skribi leterojn al deputitoj, senatanoj kaj al la ministro pri Edukado.
- 2) nia internacia infandesegno-ekspozicio en Saint-Sulpice-et-Cameyrac (Girondio)
 Nia kamarado Michel Lavergne starigis tiun ekspozicion en la festsalono de sia urbeto. Televido FR3 venis por la inaŭguro la 29an de januaro. Pli ol 1500 infanoj vizitis dum la sekvonta semajno kaj multaj geinstruistoj informigis pri la internacia lingvo. Multaj artikoloj kun fotoj aperis en la ĵurnalo "Sud-Ouest". Estis neantaŭvidebla sukceso ; verŝajne je la komenco de la venonta lernjaro, estos E-kurso en St Sulpice.
- 3) japana vizitanto La 1an de marto, en CENON-Palmer, je la 18a horo, nia grupo akceptos junan japanon el Hiroŝimo, vojaĝantan tra Eŭropo. Estos publika kunveno. Leo Robert prezentos kelkajn lumbildojn pri Japanio kaj poste ni faros demandojn pri la vivo en Japanio kaj ni tradukos por la neesperantistoj.
- 4) pactago en Bordojo : la 16an de aprilo '83. Ginette klarigis, ke pluraj asocioj laborantaj por la mondpaco preparas tiun feston. Ĝi okazos verŝajne sur la Parlamenta Placo (Place du Parlement). Nia E-grupo deĵoros ĉe budo.
- 5) la venontaj kunvenoj
 * marto : la 19an je la 14a horo en EYSINES, Kulturcentro.
 * aprilo : la 23an, aŭ en Bonnetan, aŭ en CENON, je la 14a.

Ni vidos lumbildojn de la partoprenintoj en la SAT-Kongreso en Iisalmi.

- * majo : ni kunvenos en Ĝersio dum la regiona kunveno.
- * junio : espereble ni akceptos polinon, invititan de A. Lagoutte (66), kondiĉe ke ŝi sukcesu eliri el sia lando. Pluraj el ni gastigus ŝin en Ĝirondio. Ĝis! Joël.

Eldonpreta estas la libro de S-ano VEDRINE (kiu prelegis pri tiu sama temo okaze de la kongreso de SAT-Amikaro en 1982) en franca lingvo pri "Esperanto kaj la esperantista movado en Liono, de la komenco ĝis 1950". Ĝi estos 100-paĝa kaj entenas fine resumon de la E-gramatiko, kio ebligas ĝin uzi ankaŭ varbcele. La vendprezo por antaŭmendoj estas fiksita je 33,50 FF (kun afranko). Interesatoj mendu jam al : E. GALLON, 1 rue du Lac, 69003 LYON, pĉk: 1342 42 N LYON. Tio helpos fiksi la necesan eldonkvanton. Al francaj gelaŭtuloj ni rekomendas la akiron de tiu libro, kiu povos instigi similajn esploradojn pri la E-historio en aliaj regionoj. Red.

Nia kriminala felietono : Oni prenas aliajn kaj oni rekomencas ! Philippe Delannée , en malliberejo depost la 6a de okt.1982 estis provizore liberigita la 22an de jan. 1983 : 3 monatojn kaj ½ pro opinidelikto. Partizano de civila neperforta nacidefendo, li rifuzis surmeti uniformon ĉe sia enregimentigo. Kvankam finiĝis la provizora malliberigo, li tamen riskas karcerpunon ĉe sia proceso. Endas postuli de la ministro pri justico kaj de la respublika prokuroro en Lille, ke oni rezignu laŭleĝe postuli kaj celu mal-kondamni lin. Ph.Delannée opinias, ke nur aŭdaca plibonigo de la statuto de militrifuzantoj povas ĉesigi tiajn enkarcerigojn neakordigeblajn kun demokrateco kaj personaj rajtoj. Ĉiu rajtu esti agnoskebla kiel militrifuzanto !^{por} Rajtu la militrifuzantoj agi kontraŭ la militoj kaj/aliaj konceptoj pri nacidefendo. Ne, al la puna diskriminacio per civilservo nun duoble pli longa ol la militservo ! Adreso de lia subtenkomitato : Comité "Amélioration de la loi d'objection" ĉe Pierre JENNEQUIN, 5 rampe St Marcel, F 02000 LAON, Francio.

"Necesas, ke oni alvenu al la armeo preparite, kaj preparite de la lernejo, la liceo kaj la universitato. Necesas simbiozo kun la nacia edukado." Charles HERNU, ministro pri nacia defendo en Francio. Pri tio vi legos en venonta L!

Petro :

la kruco, la falĉileto, la martelo

Iam, kiam mi estis dekjara, mi estis kuiristo antaŭ ol esti laboristo kiel la aliaj, sed malgranda. Mia patro kun aliaj liniis novan vojon de mia urbo al alia, por ke oni povu veturi per ĉaroj kaj aŭtomobiloj anstataŭ iri per kvarpieduloj. Mi iradis kun mia patro dek kilometrojn malproksime kaj kelkfoje ni revenis hejmen post unu semajno. Dum tiuj semajnoj ni tranoktis ĉe iu, kiu amikiĝis kun mia patro, kaj dum la tago ni manĝis apud rivero sub ponto, kiu ŝirmis nin kontraŭ pluvo kaj suno ; kaj estis tie, kie mi kuiris precipe la tagmanĝon kiu bezonis pli da zorgo ol la matenmanĝo. Frumatene li foriris al sia laboro, preparinte por mi la rizkvanton aŭ terpomojn, kiujn mi devis kuiri je la horo de li fiksita, por ke la manĝo estu preta je lia alveno.

La laboro de mia patro daŭris longtempe kaj la mia same. Poste, kiam oni komencis ŝtonigi la vojon, ni foriris al iu ŝtonminejo, en kiu oni laboris per pioĉo, elfosilo ktp, kaj martelo (ĉiuj scias tion).

Kompreneble, de kiam mi komencis mian kuiristan laboron, la infana lernejo estis fermita por mi ; mi devis trovi vesperan lernejon, en kiu oni akceptis min, foje kontraŭ pago, foje senpage. Tiel mi povis daŭrigi mian lernadon post la labortago. Mi lasas vin imagi ĉiajn mal-facilaĵojn, pensante, ke en tiu epoko la daŭro de la labortago estis tiel longa kiel la sunlumo. Dum la vintra sezono la tagoj estis pli mallongaj ol dum somero, do la laboro malpli peniga ; sed frostis terure, kaj ofte mi estis envolvita kvazaŭ mumio, precipe dum la irado ; en la laboro mi batalis per martelego kontraŭ la frostoj.

Mia patro rezervis ĉiujare du monatojn, julion kaj aŭguston, por la grenrikolto, ĉar dum tiuj monatoj, falĉante oni enspezis multe pli da mono ol dum la monatoj laborante en la vojo aŭ ŝtonminejo. La rikolton oni faris per falĉileto. Mi devas diri (sen insisti, ĉar tiu, kiu havis metion, scias, ke finfine oni "amas" la ilon, per kiu oni laboras), ke ĉiu familiano havis sian falĉileton, kiu apartenas al li kaj kiun neniu rajtas tuŝi. Ni havis du en rezervo, ĉar kelkfoje okazis, ke kaŭze de la multaj ŝtonetoj sur la kampoj, tiu de kelkiu rompiĝis. Tiam oni prenis unu el la rezervo ; sed kutimiĝinte al la rompita, oni ne laboris facile ĝis al kutimiĝo. Pro tio oni amis la sian.

Ni havis tendon por la tuta familio ; ni jam estis kvin gefratoj kaj la du gepatroj, kaj laŭ la vetero ni kuŝis po tri aŭ kvar ekstere ; se la vetero estis malbona, ni tranoktis ĉiuj sub la tendo. Kiam ni ellitiĝis frumatene por komenci la falĉadon, neniam ni portis la falĉileton en la mano ; ĝi tranĉis kiel raztranĉilo kaj oni devis atenti tuŝi nenion per ĝi, ĉar okazis, ke ekzemple frapante nevole kontraŭ la kruroj oni vundis sin. Do, ni pendis ĝin ĉe la zono en la postaĵa parto. Oni emmanigis ĝin, nur kiam oni estis apud la sulko pretaj komenci. Kiam la falĉado estis finita, oni oleumis kaj ĉirkaŭvolvis ĝin per papero aŭ ĉifono kaj oni gardis ĝin zorge por la venonta jaro. Mi amis mian falĉileton!

De tie ni revenis al la nova vojo ; antaŭ ol sterni la ŝtonon oni devis ŝtonhaki ĝin. Pro tio oni aĉetis taŭgan martelon, kaj mia patro, kiel la aliaj, elektis tenilon el olivarbo. Tiu stango estas tre fleksebla kaj pro tio ĝi pli bone toleras la frapadresendon en la manoj. Oni komencas, segante la stangon el la olivarbo ; poste oni senŝeligas ĝin kaj rabotas la tuberetojn, unue per tranĉilo, poste kaj fine per vitropeco ĝis perfekta glateco. Certe tiu glateco estas milda al la manplatoj, sed tio ne malebligas malmolecon de la manoj. Kelkfoje oni eraris je proksimume du aŭ tri centimetroj la frapon kontraŭ la ŝtono kaj la tenilo rompiĝis kaj ĉiufoje estis malagrablaĵo, ne nur pro la tempo perdita por ripari, sed precipe, ĉar oni pensis pri la dek aŭ dekdu centimetroj da perdita tenilo. Oni multe amis la martelon (kaj ĝian tenilon!).

Kiam mi estis tute juna, sep aŭ ok-jara, mi estis tre malsana ; min trafis krupo, kaj mia familio pensis, ke tre eble mi forpasos. Tial mia patrino, kiu kredis je Dio, sed ne pli, ne sciante kion fari, oferis al iu virgulino, (mi ne memoras kiun, sed devis esti la patronino de la urbo), ke kiam mi estos pli granda, mi vestos ian monaĥan veston dum la sankta semajno, tio estas dum la procesioj de Pasko. Kiel vi povas konstati, mi ne forpasis kaj la voto de mia patrino devis realiĝi. Do mi travestiis min ekde mia dekdua jaro ĝis mia dekseka.

Dum tiuj procesioj oni promenigis la sanktulojn ŝultre inter kvar uloj ; aliaj siavice, ankaŭ ŝultre, estis ŝarĝitaj per granda kruco ĝis laciĝo. Mi neniam vidis la utilecon de tiu laciga promonado. Ankaŭ mi, kiel mia patrino, iom kredis al Dio, sed mi trovis tiajn ce-

remoniojn iom strangaj. Iom post iom, leginte pri la krucovojo de Kristo, kaj vidante la suferon de la kruoportantoj, mi malpli ŝatis krucon.

Mi devas diri, ke la sinteno de ia pastro ne helpis min plu kredi al tiaj ceremonioj. Iam, mia patro vendis unu kuban metron da sablo al la pastro ; kelkajn tagojn poste, mia patro sendis min al la pastro, por ke li pagu al mi la prezon de tiu sablo. Tion li faris, sed li konservis kvinonon de la sumo, dirante, ke tiunmonon li bezonas por pli-bonigi sian preĝejon, do por la bono de ĉiuj. Mi timeme diris, ke mia patrino bezonas la tutan monon por vivteni nian tutan familion ; sed li nenion volis aŭdi. Mi revenis hejmen kaj rakontis tion al mia patro, kiu tuj iris al la pastro, kaj post disputo, kiun vi povas imagi, revenis al la domo kun la kompleta sumo. Ŝajnas al mi, ke tia ago de la pastro influis iom pri la kruca afero ; mi ne plu ŝatis krucon.

Poste alvenis Respubliko kaj mi komencis vidi falĉiletojn kaj martelojn plektitajn, kaj mi pensis : Tio devas esti emblemo de laboro. Kaj mi memoris la utilecon de ambaŭ iloj kaj ĉiujn cirkonstancojn. Mi amis pli kaj pli la falĉileton kaj la martelon.

Tiu rakonto naskiĝas kaŭze de diskuto kun amiko mia. La kaŭzo de tia diskuto estis, ke, parolante pri Polio, mi esprimis mian miron, vidinte per televido ulon, kiu iris al la laboro kun kruco sur la ŝultro. Mia amiko diris al mi, ke iri al la laboro kun kruco aŭ kun falĉileto kaj martelo estas la sama afero. Ne por mi. Mi preferas la lastajn al la unua.

Iu legantino de "Laŭte" miris, ĉar delonge ŝi nenion legas de Petro. Mi skribas tiun rakonton, unue responde al mia amiko, due por ĉiuj Laŭte-legantoj kaj trie por Lina, kiu eble post legado, diros al mi : "Ĉesu! Aŭ skribu pri alia temo."

Petro.

N A S R U D I N

Nasrudin petis la edzinon kuiri viandon por gastoj. La manĝo alvenis sen viando. Ŝi estis manĝinta ĝin.
"La kato manĝis ĝin, tutan kilogramon", ŝi diris.
Nasrudin pesis la katon. Ĝi pesis unu kilogramon.
"Se jen la kato", Nasrudin diris, "kie la viando ? Aŭ, se jen la viando - kie la kato ?"

Kris Long.



ĉies voĉo

(tie gelaŭtuloj povas
"femi" * laŭplaĉe!)
* vd. p.14/15...

K I O E S T A S C I O N I S M O ? *****

La cionisma movado renkontis ekde sia fondiĝo fervorajn adeptojn kaj subtenantojn unuflanke, kaj akre oponantojn ĉe la alia ekstremo - ĉe judoj kaj nejudoj egale. Ĉu ĝi estas manifestiĝo de iuspeca naciismo, eĉ ŝovinismo aŭ rasismo, kiel iuj asertas, aŭ kontraŭe - nacia liberiga movado de multe persekutata popolo, el humana vidpunkto plenrajte pravigita, jen resumo de diverĝaj elirpunktoj. La celo de tiuj ĉi skribaĵo ne estas ideologia analizado de la fenomeno cionismo, nek pesado de argumentoj por aŭ kontraŭ ĝi. Tra imagita intervjuo okazunta dum la dua mondmilito, la verkinto de tiuj ĉi linioj prezentas la motivojn de sia decido eltiri la konsekvencojn de sia cionista konvinko por enmigro al Palestino, pli ol sep jarojn antaŭ la sendependiĝo de Israelo. La scenejo - haveno ĉe la Nigra Maro, sur la ferdeko de kaduka kaj "kontraŭleĝa" ŝipo, sur kies ferdeko amasiĝis sescent judoj enmigrontoj, portantaj tutan sian havaĵon en malgranda dorsosako, kiun la aŭtoritatoj grandanime permesis al ili kunpreni. Jen la neeldiritaj adiaŭaj vortoj :

"Karaj eŭropanoj, estis granda plezuro vivi inter vi dum preskaŭ miljara periodo, tamen nun alvenis la tempo disiĝi por ĉiam. Niaj prauloj elpelitaj fare dela romiaj konkerantoj, dissemiĝis en la tuta terglobo, serĉante al si ripozon kaj trankvilon. Per krea laborado, dank'al elstaraj talento, kapablo, diligento, ili ĉeflanke de la gastigantaj popoloj kontribuis al la antaŭenigo de la ekonomio, kulturo, arto kaj scienco de la nova patrujo, en mezuro multoble superanta ilian nombran proporcion. Ili rapide adaptiĝis al la fremda medio, ellernante ĝiajn morojn kaj kutimojn, resignante ofte pri sia nacia kaj religia identeco. La reago ne forrestis : anstataŭ dankesprimoj kaj honorigo venis de via flanko malfavora diskriminacio,

kalumnioj, subpremo, inkvizicio, pogromoj, aŭtodafeo. En la primitiva menso de la popolamasoj sukceso vekis ne rekonon, admiron, sed envion, de kiu nur paŝeto kondukas al malamo. Kelkfoje iu klera reganto moŝtis grace regali nin per egalrajteco ; post kutime mallonga transira periodo, la laŭvica duko aŭ imperiestro restarigis la senrajtigajn leĝojn. Ĉar pekokaproj ja ĉiam estis bezonataj kaj tiun ĉi rolon vi volonte altrudis al ni. Se ni restis fidelaj al niaj tradicioj, oni brulstampis nin kiel fremdajn elementojn, okulfrapajn per sia malsameco. Se ni asimiliĝis, oni akuzis nin per kamufligo, cele al ruza enpenetro en la kristanan socion por korupti ĝin de interne...

Ni estis kulpigitaj jen per revoluciemaj tendencoj, celantaj subfosi la firme establitan sociordon, jen per kunlaboro kun la reakcia feŭda reĝimo. Ni estis kondamnitaj foje kiel kapitalistoj kaj plutokratoj, foje kiel komunistoj, ĉiukaze danĝeraj. Fondiĝis politikaj partioj kun deklarita antisemita programo. La incita veneno estis abunde dissemita tra pamfletoj, ĵurnaloj kaj libroj. La kristanaj eklezioj siavice ne postrestis en la ŝveligado de la pasioj, kulpigante nin kiel mortigantojn de dio. Kvazaŭ la kruelaj persekutoj kontraŭ "herezuloj" kiel Ĝiordano Bruno, Jan Hus, Zwingli, Servet kaj la hugenotoj fontus el pura kristana amo. Ĉar vi havis ĉiam du mezurunuojn kaj kriteriojn : unu por la judoj, la alia por la cetera mondo.

Karaj eŭropanoj, ĉi tiun "ludon" ninjam forte tedas. Alvenis tempo meti finon al ĉio ĉi. Ne, ni eĉ ne koleras kontraŭ vi. Vi nur plenumis la rolon komisiitan de la historio per nia "punado", kaj ni senvole rolis kiel subpremitoj, surtretitoj. Sed nun ni komencu ion tute novan. Ni disiĝu en paco por la bono de ni ambaŭ. Vokas nin nia antikva lando, Palestino. Vere, ĝi estas neglektita, neevoluinta, duone dezerta, ne plu "lando, en kiu fluas lakto kaj mielo". Ni revenas al ĝi post paso de dekoj da generacioj, por rekonstrui kaj refekundigi ĝin. Niaj pioniroj sekigos la miasmajn marĉojn, igos la dezerton floranta, plugos kaj prisemos ĝian agron, plantos arbojn, konstruos ŝoseojn, uzinojn kaj fabrikojn. Ni revivigas el ĝia ŝajna morto nian antikvan hebrean lingvon, en kiu la Biblio estis skribita. Se necesos, ni batalos ankaŭ por sendependigo de nia retrovita patrujo, uzurpata de fremduloj. Dum jarcentoj ni oferis niajn vivojn por fremdaj celoj ; abunde kaj vane fluis nia sango kiel ŝirmoleo sur la radoj de la plej diversaj "ismoj". Alvenis tempo finfine agi por niaj propraj celoj.

Ni alte taksas viajn kulturajn valorojn, karaj eŭropanoj, ni admiras viajn elstarajn eminentulojn. Sed ni fle-gu unuavice nian propran nacian kulturon. Nia nacio, kiu donacis al la mondo galerion da personoj kiel Spinoza, Marks, Zamenhof, Freud kaj Einstein, neniam devas honti pri siaj propraj kulturaj valoroj. En niaj lernejoj ni ins-truos ankaŭ pri granduloj kaj herooj, kiel Frederiko la Granda, Napoleono, Ivano la Terura, kiuj ja apartenas al vi. Ni kontentiĝos kun niaj samgenteroj, kiel Moseo, Reĝo David kaj la Makabeoj.

Karaj eŭropanoj, ni disiĝas de vi sen rankoro kaj amar-eco. Ni ja renkontiĝos en la estonto, sed ĉi-foje kiel sam-ranguloj. Se vi vizitos en nia lando, ni bonvenigos vin. La saman akcepton ni esperas, se ni gastos ĉe vi por vizi-to. Ni interŝanĝos niajn produktaĵojn; ni vendos al vi oranĝojn, bananojn, daktilojn kaj aĉetos lignon, nafton, maŝinojn. Ni vivos daŭre en bona najbareco, ne interne, sed flanke de vi. Ni denove dankas vian du-miljar-longan gast-igadon kaj adiaŭas vin. Ĝis revido en aliaj, pli agrablaj cirkonstancoj !"

Jen la teksto de la neeldirita intervjuo, kies enhavo tute ne malaktualiĝis dum paso de 42 jaroj. Mi trasentis, ke per miaj simplaj, neelserĉitaj vortoj, sen pretendo de profundiĝantaj analizoj, mi esprimis la kvintesencon de mia cionista kredo, pri kies pravo mi estas nun konvinkita eĉ pli, ol iam ajn antaŭe.

Teddy Löwenkopf.

Pri "S O L I D A R I T É P A L E S T I N E"

Ĉu vi konas la ĉiumonatan gazeton "Solidarité Palestine" eldonitan de A.M.F.P. (Franc-Palestina medicina asocio) ?

Mi ne estas "antijuda" nur anticionista. Tamen mi havas bonajn geamikojn en Israelo, sed mi ne povas samopinii kiel ili pri cionismo. Antaŭ du jaroj mi vizitis tiun lan-don, la aĉajn kvartalojn en Betleĥem, Jeriĥo, Ako, la eks-palestinan malnovan urbon de Jafo renovigitan nur por tu-ristoj. Jes, belega nun ĝi estas, sed kien foriris la loĝ-antaro ?

Unu el la cionismaj tendencoj superregintaj la koloni-aron duonjarcente, celas la progresivan "judigon" de la araba Palestino.

Ne de longe mi abonis "Solidarité Palestine". Mi mire

konstatis la objektivon de ĝiaj valoraj, homaj artikoloj kaj atestoj. Dank'al la presilo de "Témoignage Chrétien", tri tag-ojn post la gazet-farado, ni ricevas ĝin. Tio ebligas sekvi pli bone la aktualajn eventojn.

Jen kelkaj titoloj pri interesaj artikoloj :

- Mahmud Darwich, palestina poeto, sen patrio kaj azilo.
- El Ansar (palestina tendaro), kuraĝa, israela oficiro ates-tas : "Mi vidis kaj aŭdis". Legante tiun ateston, mi indig-nis pro la devigata, terurega tasko farita de la "nefieraj" israelaj soldatoj. De supre de gvatoturoj ili gardas sep mil "alportitojn", tiel nomitajn de Israelo. Ili ne estas militkaptitoj, sed ia speco de parioj malakceptitaj de ĉiuj.
- Okupitaj teritorioj. En la Cisjordanaj malliberejoj stu-dentoj de Ber Zeit akuzas. 15 profesoroj estis elpelitaj el la Ber Zeit-universitato kaj aliaj el tiu de El Najjah, Naplouse. La milita registaro postulas, ke ĉiuj palestinaj profesoroj posedantaj jordanan pasporton subskribu politi-kan deklaron kondamnanta P.L.O., por ke denove ili hav-igu al si sian rezid-vizon.
- Ĉiam en Cisjordanio, atesto pri la ĉiutaga vivo sub okup-ado. Provo de neperfortaj agadoj de tiu ĉi malfeliĉa loĝ-antaro.
- La perfortado kontraŭ la homaj kaj naciaj rajtoj de la pa-lestina popolo en la okupataj teritorioj, raporto de Ilan Halevi, membro de la PLO-delegacio en UNO. I. Halevi, is-raelano subtenanta la palestinan aferon, animis debaton pri Palestino okaze de la porpacaj internaciaj renkontiĝoj en Larzako antaŭ du jaroj.

Abono al "Solidarité Palestine" kostas 50FF. Adreso : AFMP, 14 rue de Nanteuil, 75015 Paris.

Ginette.

El letero : "En la lasta numero Jansebo batalas kontraŭ vort-inflacion. Tute prave, laŭ mia opinio. Multaj novaj vortoj estas nur senutilaj sinonimoj... Ni aŭdas ofte pri la usonaj "Pershing"-armiloj. Ĉu ili estas danĝeraj armiloj ? Certe, la okcidentaj pacistoj diris tion, kaj ankaŭ la orientaj. Kaj la sovetaj "SS 20", ĉu danĝeraj ? Tute ne. La orientaj kaj okcidentaj pacistoj ne plendis pri ili. Do, kion fari ? Ekipi ĉiujn landojn per kiel eble plej multaj nedanĝeraj SS 20 !... Sed eble mi estas stulta... "

Marius.

Respondo al Ĵansebo pri vortinflacio :

Jen provo por solvi la problemon de la vortinflacio : La n^o 11/81 de "Esperanto" estis "facila numero". La plimulto de artikoloj en tiu revuo estis konstruita nur per eroj el listo kun 1000 vorto-partoj (vorto-parto estas iu ajn parto de vorto, kiu portas signifon, do interalie ĝi povas esti finaĵo aŭ simile).

La listo estis kunmetita el jam ekzistanta listo, kiu nomiĝas "baza radikaro oficiala", kaj el la vortoj de la unuaj dek lecionoj de kelkaj lernolibroj.

Por la plej facilaj artikoloj, kiuj estis presitaj pli grande, oni uzis eĉ nur 500 vortojn de la listo.

Tiu listo estas tre taŭga, ĉiu Esperantisto devus koni ĝin, kaj ankaŭ ĉiu, kiu volas verki legaĵojn facile kompreneblajn.

GoMo.

Pri simpligo de la lingvo :

La veraj fundamentoj de E-o estas simpleco, logiko kaj universaleco. Estus do fundamente bone, se oni forigus el la lingvo ne utilajn komplikaĵojn. La ideala formulo estas : unu ideo per unu vorto. Ne decas, ke en E-o estas du, tri... ĝis dek vortoj por unu nura ideo. Tio malfaciligas la lernadon, la interkomprenon kaj la internacian uzadon.

Kial konservi sinonimajn parojn ? (karbo = karbono, azoto = nitrogeno...) kaj seriojn de samsignifaj vortoj ? (klafto, futo, ulno, colo, mejlo, versto, arŝino, jardo, stadio, metro... grano, gramo, funto, lodo, siklo, unco, tuno, tonelo, karato...). Do por la ideo "unuo de distanco" oni konservu nur la oficialan internacian "metron". Por la ideo "unuo de maso" estiĝas problemoj : la internacia efektiva unuo estas la "kilo", nomita ankaŭ kilogramo, kvazaŭ la gramo estus la ĉefa unuo, sed kilo signifas ankaŭ mil kaj parto de ŝipo...

Konklude : Ne estas tiom simple simpligi la lingvon, sed oni nepre devas tion fari.

P.M.G.

"C I" kaj "V I"

Mi legis kun granda interesiĝo la artikolojn de Gabalda kaj Lentaigne sub la respektiva titolo: "Ci fundamenta vorto, Pri "Ci", kaj mi rememorigas la samtemajn artikolojn aper-

intajn en SAT-Amikaro, subskribitajn de Rapley kaj Simone Gaillard. Mi aldonas mian opinionon.

Ni ĉiuj scias, ke la angla lingvo ne diferencigas "ci" kaj "vi", sed aliloke preskaŭ ĉie en Eŭropo oni diferencigas la cidiradon kaj la vidiradon. Ĉu Esperanto povas ignori tiun distingon inter "ci" kaj "vi" konatan de tiom da Eŭropanoj? La cidirado progresas jam de pluraj jaroj ĉefe ĉe la junuloj. Ili ofte enkondukis ĝin, preskaŭ trudis ĝin ; ĉar la junuloj scias, ke la cidirado signas amikecon, amon aŭ pli simple plezuron kune vivi.

Vi lasu la junulojn veni al ni, lasu ilin uzi esperanto-lingvon, kiu povas speguli iliajn sentojn. Ni ne disiĝu de "CI" ! Transiri de "vi" al "ci" estas delikata elekto. La vidirado povas esti signo de malrespekto, eĉ de insulto. La singardemo en la uzado de "ci" kun niaj amikoj estos nia regulo kaj ni scios uzi sen trouzi.

Konklude mi opinias, ke nia internacia lingvo perdos multe de sia riĉeco, se ĝi disiĝos de "ci".

Henriko.

N.B. Ĉu Junul-Kurso en la ĵusaj eldonoj enkondukis la uzon de la pronomo "ci" ?

Pri la pronomo CI

La pronomo CI estas komplikaĵo, ĉar en ĉiuj lingvoj oni uzas ĝin malsame, kaj estas malfacile lerni la nuancojn, kiujn tiu aŭ alia popolo metas en ĝia uzo : de la uzo nur por Dio kiel en la angla, al uzado por ĉiuj kiel en la araba, en Francio la uzo varias de familio al familio kaj de jardeko al jardeko ! En E-o oni do uzu ĝin laŭvole por imiti naciajn parolmanierojn. Sed kiel traduki la pronomojn de la lingvoj, kiuj ciumas en pluralo, kiel la germana aŭ la hispana ?

La prononco estas ĝenerala temo, ĉu oni devas permesi neekzakajn prononcojn al popoloj, kiuj malfacile elparolas la E-ajn sonojn ?

La nordaj Francoj ne atendis tian permeson por prononci R siamaniere "palate" anstataŭ "lange". Do tiuj, kiuj prononcas pli facile C "interdente" kiel hispanoj, angloj, araboj.. ne hezitu, lasu la "tci tscias tcian lécionon" al germanoj kaj slavoĵ. Iom da nesameco ne malhelpas la komprenon, dum oni ne konfuzas literojn. Male, la uzo de simpla nekonfuzebila sono estas malpli erariga ol la oficiala diftongo kaj tiel faciligus la uzadon de E-o por parolkomprenantaj komputiloj.

P.M.G.

Pri komputiloj

Komputiloj povas ĉion fari, sed ili faras pli efike kaj rapide tion, kio estas logika. Tial oni uzas * anstataŭ x por multobligado por ne konfuzi kun x litero, ~~o~~ por nulo por ne konfuzi kun O litero. Tial oni devas evoluigi E-on, se oni volas, ke ĝi estu la plej bona lingvo uzenda por komputiloj. Unue : nepre forigi la supersignojn, uzante Q X W Y por Ŝ Ĉ Ŭ Ĝ (Ĥ kaj J, kies ofteco estas malpli ol dekmilono, ne gravas kaj povas konfuzi kun K kaj S).

Sen tiu reformeto oni bezonas multekostan komputilon por tajpi supersignojn kaj ne eblas fari pli ol ordinaran kompostadon aŭ tajpadon, teknika aŭ faka verko estos plena je eraroj ! Interkomunikado tute ne eblas, vi ricevas # aŭ £ aŭ @ anstataŭ la karaj ĉapelitaj konsonantoj !

Due : oni devas krei komputilan prononcon sen mallogikaĵoj : C = TS, Ĉ = TŜ, Ĝ = DJ. Eĉ multekostega komputilo neniam povos senerare kompreni la parolatan lingvon. Jam estas taŭga propono por C, ekzistas ankaŭ malnova ekzemplo : Ĥino = Ĉino, ĉu ĝeneraligebla ? Kelkiuj male proponas ŝanĝi la ortografion : C = TS, TX = Ĉ, DY = Ĝ. Simpla sed tro peza solvo.

P.M.G.

Ĉu alia esperanto ?

En fremdlingva fako de mia lernejo kelkan tempon mi lernis du naciajn lingvojn. Tio kapabligis min eldiri frazojn de la ĉiutaga vivo kaj helpe de vortaroj kompreni literaturajn tekstojn. Mia fuŝa esprimmaniero certe konatigis min al indiĝenoj kiel eksterlandano, kiu klopodas diri siajn dezirojn kaj intencojn verŝajne ofte ne laŭ korekta gramatika kaj sintaksa reguloj.*

Posedante jam iom da praktiko en uzado de fremdaj lingvoj, mi hazarde aŭdis pri E-o, lingvo facile kaj rapide lernebla pro siaj konciza, preciza gramatiko, internacia vortprovizo kaj fleksebleco pere de pre- kaj sufiksoj. Estis tiu propagandata simpleco, kiu allogis min, kaj studante E-on, mi konstatis, ke ĝi efektive taŭgas por ĉiuj terenoj de la homaj esprimbezonoj.

* Tiurilate mi rekomendas legi la eseiron de William Auld "Pri lingvoj kaj aliaj artoj" kaj aparte la artikolon "Ĉu prefere nacilingvon?".

En "Laŭte!" kaj aliloke lastatempe mi legis pri proponoj pliprecizigi, plibonigi E-on. Mi estas nek lingvisto nek presisto - kaj mi opinias, ke la plej multaj el la legantoj ne havas tiujn profesiojn -, do mi ne povas prijuĝi, ĉu tiaj modifoj estas necesaj aŭ taŭgaj. Sed kio koncernas min, ili konfuzigas min, kaj mi demandas min, ĉu mi nun lernu alian E-on, kun eble eĉ alia skribmaniero.

Projektoj pri artefaritaj lingvoj jam ekzistas ekde la mezepoko ĝis nuntempo ; ekzemple, post mondmilito II aperis i.a. IALA, INTAL, Translingua, sistemfrater, ktp ; projektoj, kiuj abortis aŭ plejparte ne atingis la vizaĝojn de la publiko.

Ni ĉiuj scias, kiel malfacile estas varbi homojn al la lernado de lingvoj, kaj speciale al E-o, kiu ĝenerale ne donas monan profiton. Ĉu ni komplikigu nian varbadon per diversaj esperantoj ?

Kurt Schut.

Pri forigo de dogmoj

En Laŭte 42, B.G.D. deziras forigi dogmon, tiun de l'nombro pi = 3,141592654... Tiu ne estas dogmo sed fakto, en nia universo multaj rilatoj en geometriaj formoj, fizikaj fortoj, elektraj agoj estas kalkuleblaj per tiu nombro, kiun oni konas nun dank'al potencaj komputiloj ĝis la ducentmila cifero! En la Biblio ĝi estis citata nur per unu cifero 3, la grekoj konis ĝin kun kvin kaj antaŭmilite oni fieris pri sep cent ! La komputiloj alportas konojn de la realaĵoj de la mondo miloble pli precizajn ol antaŭe. La dogmo forigenda estas : "preciza kono ne utilas". Malpreciza kono estas ofte erariga kaj ebligas trompi homojn kaj malhelpi progreson.

P.M.G.

De tute nova abonanto jen pripensoj post legado de la unua "Laŭte!" :

..... M O N O L O G E.....

..... kio estas la rozbedoj, kio estas nepra neceso.....
***** kaj kio estas "esperanto" por mi aŭ ni ? *****

Mi ne scias ĉe la 45a de "Laŭte!" kia artikolo aperis el la plumo de Daniel L., ĉar mi estas nova abonanto - nu, saluton! Ĉiukaze mi supozas, ke verŝajne Daniel plende kritikis kontraŭ la agado de francuja prezidento. Pro tio kontraŭe Paul S., kiu verŝajne subtenus aŭ atendus francujan

socialiston aŭ prezidenton, kontraŭdiris, ke estas nur fantaziaĵo kaj agreso senbaza...

Nu, kiu estas François M. ?! Ĉiuokaze li ne estas mia najbaro nek povis mi trovi tiun nomon en la adresaro de "L!". Ĉu li estas esperantisto ? Resume mi ankoraŭ ne povas legi facile francan ĵurnalon nek interesiĝas tiel multe aparte francan politikon. Sekve mi scias apenaŭ iomete pri li aŭ lia partio.

Sed nature mi tre interesiĝas pri E-movado de Francio. Do mi deziras skribi pri mia "esperanto" sen ĵurnalaj informoj. ...Kio estas "esperanto" ?... Por mi, eĉ se kia ajn kandidato subtenus E-on, krome promesus la realigon, kaj poste eĉ se plue li, kiu fariĝis prezidento, kaj lia partio vere per la ŝtata politika forto realigus la Esperanto-edukadan sistemon en tuta Francio, aŭ male tute perfidus siajn elektintojn, kiuj konfidis sian tutan esperon per nur paperpeco por la baloto, ĉio estus nur interna politika afero de Francio kaj neniel rilatas kun esperanto-movado!

Ĉar ni deziras pli multe da esperantaj esperantistoj kaj esperantoj - t.e., ke ni devas esti unue "esperantoj" antaŭ ol esti esperantistoj... nome, tio ne signifas "spektantoj" kiel la opinio de Daniel, se ne tie venos malkontenteco kaj disreviĝo aŭ kontraŭe superflua ĝojo, ambaŭ sen nepra neceso. Krome, "esperanto" ne estas eĉ "atendanto" pro la politika situacio, kiel la opinio de Paul... Do, resume, por mi esperanto signifas la ulon kiel Zamenhof uzis, kaj plie la esperanto-movadon mem.

Kio estas la esperanto-movado ? Tio tute ne rilatas kun politika movado kaj tio estas absoluta (= nerelativa, eĉ kontraŭpolitika) kultura movado por humanismo kaj tuta homaro. Alivorte ni povas diri ankaŭ ke la e-movado estas kontraŭtezo kontraŭ politika movado (fakte ĝi estas pesila ludo kaj superinforma milito).

Ĉu ni devas daŭrigi apeli la bonegecon al la tempa prezidento aŭ registaro ? Nature, se François M. loĝas tie kiel via najbaro, nepre faru tiel, se ne, se iu tempa potenculo, kiu ne scias eĉ "a,b,c,ĉ" de Esperanto, volos forte subteni ĝin pro la oportuna ilo, plue reĝimigos esperanton kiel devigan instruobjekton por ĉiuj francaj gejunuloj kaj geknaboj, ĉu ni devos kore ĝojegi kiel feliĉaj ? Kiel bonŝance !? Ĉu jes? Kaj francaj esperantistoj : "Ni finis nian laboron, do ni ripozu sur la lito, ĉu ne ?" ... Ne, ne, ne! Neniam! Neniel! Tio ne estas "esperanto"! Ĉu vi estas francaj esperantistoj? Mi deziras ĉiam sennaciajn esperantistojn.

... Mi ne finis altan lernejon kaj komencis mian vojaĝon. Mi havas plurajn kialojn. Unu el la kialoj estas, ke mi tute ne ŝatis la modernan edukadan sistemon. Nun mi ne skribas pri tio. Tamen esperanto estas ne nur utilisma internacia ilo, sed volonta lingvo por ĉiuj, kaj ne estas relativa aŭ malgraŭvola internacia lingvo kiel angla, franca, germana, rusa, ktp, laŭ la politika aŭ ekonomia potenco. La popolo, kiu devas lerni "esperanton", ne estas nur studentoj, lernantoj, ĉar tio ne estas utilisma oportuna ilo, sed unika movado por ke ĉiuj, kiuj vivas sur la tero, postvivu kun varma harmonio, tio estas la plej granda eksperimenta arto de l'homaro. Tiu belega kompletigo dependas de niaj diversaj spontanaj aŭ memvolaj persistemoj kaj agadoj. Kie ekzistus diplomito de esperanto ?? Ĉu "esperinto" ?! Esperantistoj kaj ĉiuj esperantoj estas senfinaj lernantoj, studentoj, kiel vojaĝanto. Popolo devas lerni esperanton kun la spirito helpe de memvola esperantisto, en volonte donacita kursejo aŭ kursejeto aŭ eĉ sen la dometo por tio. Kia instruisto povas instrui la spiriton de esperanto (= homaranismon) por sia salajro en oficiala lernejo ?... Kaj ankaŭ reciproke ni devas lerni diversajn esperantajn ideojn nek kiel instruisto nek kiel lernanto, sed sendube kiel amiko.

Esperanto devas esti tia absoluta kultura movado, kiu nek konfuziĝu nek embarasiĝu per politika ajna dolĉa delogo aŭ male ajna amara traktado, nek flatu al iu ajn politika potenco... esperanto por ĉiuj!... Se ni ne estus rapidemaj, ni povus transdoni la bonegecon, varmecon al ĉiuj sen kolero kaj sen perfido. Se ne, la movado nur facile ripetos leviĝi kaj malleviĝi kvazaŭ politika, ekonomia potenco. Kompreneble, tiu realigo estus sufiĉe malfacila, sed mi ne kredas, ke iu interna politika potenco kapablas "vere subteni" internacian, nome sennacian, homaranan, kosmopolitan, mondĉivitanan lingvon : "Esperanto, ŝtatposedigo de esperanto ??" Se ne, ĝi tuj senhezite nuligus la t.n. militservon kaj atomarmilojn kaj la armeon, ktp, ĉar tiuj estas tro kontraŭhomaranismaj. Ĉu ni povas vere lerni esperanton, posedante atomarmilaron ? ... Fakte tiaj aferoj estas tro frenezaj por ŝtata (aŭ nacia?) politika potenco...Do, franca socialisto povus akcepti E-on en baldaŭa estonteco laŭ la persistemo de iuj esperantistoj kiel ekzemple Paul, sed tio ĝis la fino estos nur kiel ia oportuna ilo por francoj. Eĉ se estas tiel, kelkaj francaj e-~~istoj~~ dirus, ke tio estas pli bona ol nenio... Sed, tamen karaj eŭropanoj, tio signifas nenion - por mi aŭ ceteraj ne-eŭropanoj -, ĉar se ni povas diri esperanton nur kiel ilon,

nome oportunan lingvon, evidente ĝi estas "eŭropa lingvo", eĉ se nur gramatike kompare iom pli facila ol alia eŭropa lingvo...esperanto sen esperantismo? - Tio povas tre facile sen obstaklo fariĝi nova koloniismo de eŭropano. Karaj eŭropanaj amikoj, ĉu vi komprenas tion?

Esperanto: tio estas nia pensmaniero kaj vivmaniero por neperforta konstruado de nia nova socio. Ĝia absoluta kulturo kaj humanismo kunligu la popolon de l'mondo kaj politiko povas ekzisti nur kiel minimume necesa malŝparo...! Ĉu mi estus bigota esperantismisto?

Antaŭ ĉio aspektas al mi, ke mi uzis iomete tro multe da vortojn "devas" kaj similajn en ĉi tiu monologo. Ili povus fariĝi nekomfortaj por legantoj, kaj pro la manko de tempo mi ne povis modifi la konsiston, sekve ofte ripetis similajn aferojn. Pardonu min! Aldone, denove antaŭpardonon(!), ĉar tio estas preferinde monologo ol laŭta diro kaj mi ne povas promesi respondon, eĉ se iu havus demandon aŭ kritikon, kaj tiel plu, kontraŭ mia "monologo", ĉar la tempo ĉiam ial ajn mankas por mi, malgraŭ ke tempo ekzistas eterne?! (ĉu?).....

... el monologo de iu ĉieesta kurioza amatora botanikisto, kiu treege interesiĝas pri seksa vivo de elefanto...!!

karaj legantoj, finiĝis ĉi tiu programero ***** ĝis!

Frivola mesaĝo: marcel (13), yvette (34), gérard (37), monique (44), jean (66), rené (66), josé (alic), jesus(barc), jukio (hir) kaj takanori (kan), kiel vi fartas? Mi estas kronike neidentigebla fluganta ĉie ajn! Jen nur tiom. Ĝis!
(de iu n.f.i-o)

(fino de p.16)

nia tintado, revenigas la brutaron surmonte forvaginta, anoncas bonajn novaĵojn kaj viziton de viaj amikoj. Do, supozeble ci jam aŭdis nin!"

"Ĉio tio nenion diras al mi, respondis la nubeto."

"Sed jes, vidu, ni estas sonoriloj, kaj ĉar post kelkaj tagoj estos Pasko, ni devas iri al Romo. Ĝis revido, etulo! Ne petolu, kaj obeu cian panjon!"

J.P.Hennebois

KIEL NASKIĜAS "LAŬTE!" (daŭrigo)

forigos la ĥemiaĵon ŝirmantan la surfacon de la plako, estos kvazaŭ trueto, kien trafluos la inko, kaj pffft! fuŝita estos la tuta plako! Do prefere ne korekti ol fuŝi la tuton. Piednote klarigu, ke la tajpanto estas stultulo, kaj ke la komprenema leganto bonvolu korekti mem. Ĉar la formato de L! estas A5 (1/2 A4), dum la ofsetplakoj estas A4, sur ĉiu plako mi tajpas 2 paĝojn. Do per du plakoj mi tajpas 4 paĝojn, t.e. 1 folion A4, Ĉu komprenite? Bone.

Ofsetplako estas 37 cm-longa. Necesas longĉara tajpilo (tion mi antaŭnelonge brokante akiris) aŭ faldi la plakon; sed se vi faldos, vi riskos difekti la plakon ĉe la faldo, ĉefe se necesos eldoni grandan kvanton.

Estas du broŝurmanieroj, do du manieroj tajpi la plakojn. Ekzemple, prenu la januaron numeron n°46. Mi tajpis p.3 kaj p.6 sur la sama plako (p.6 maldekstre kaj p.3 dekstre). Poste oni faldas la ambaŭflanke presitan folion por havi la sinsekvon 3/4/5/6, ktp. La martan numeron mi broŝuris per agrafoj, do mi tajpis faldinte la plakojn. Kvankam tio apartenas al alia parto de nia felietono, necesas tion scii, antaŭ ol komenci tajpi kiel surdulo!...

Nu, vi estis tre afablaj legi ĝis tie ĉi. Dankon! Venontokaze, mi skribos pri la presado kaj tiel plu. Dume, viaj sugestoj kaj demandoj estas tre bonvenaj.

Kribo.

Multaj artikoloj, kiuj ne povis trovi lokon en tiu ĉi n-ro, aperos en la venonta, fine de aprilo. Tiu ĉi marta aperas pli frue ol anoncite en la januara, tio por anonci sufiĉe frue plurajn E-kunvenojn. Mankas desegnoj. Malmultaj trafis la redakcejon, sed krome, pro la abundo de artikoloj, estis malfacile trovi lokon por aerumi.

Por la pasintjaraj abonantoj, kiuj ankoraŭ ne sendis sian reabonon kaj trovis ruĝan krucon lastpaĝe de la januara n°, tiu ĉi marta estas la lasta, kiun ili ricevos. Ili do urĝe repagu. Se ili preferas ne reaboni, ni tamen amike dankas ilin pro ilia ĝisnuna interesiĝo. Multaj novuloj anstataŭas ilin (jam preskaŭ 60). La abonombro estas jam 300, do certe superos la pasintjaran. La eldontaskoj fariĝas pli pezaj kaj estos tro pezaj, kiam estos pli ol 400 abonantoj. Se, tiam, helpo ne venos, necesos rifuzi abonojn! Ĉu vere? Ne-kredeble! Tion oni ankoraŭ ne estos vidinta en Esperantio! Kun Laŭte estas ĉiam surprizoj, ĉu ne? Red.

S.A.T.-BROŜURSERVO

(tute samaj adreso kaj poŝtkonto kiel por "Laŭte!")

1. La kasbilanco aperis sur p.2 de Laŭte 46.
2. Eldonado : iometa paŭzo en 1982 ; aperis nur HS (nun elĉerpita, sed reeldonota kun kompletigo), IN, ĈS, SR kaj laste EL, kun dato 1983. (Vidu vian katalogon por elturniĝi kun la kodoj!). Sed ne mankis la reeldonaĵoj : DI, EA, EH, EI, MV, UM. Tial la broŝurstoko restas kolosa.
3. Abonantaro : 87 en 1982 (nur 67 en 1981). Tio ne estas grandioza, sed tamen multe malpli alarma ol kutime.
4. Novaj eldonoj : Ĝus aperis : "Unu aŭ Nul" de Guy Marchand, la unua tutmondista libro, 108-paĝa, en esperanto. Kodo : UN, prezo : 15 FF. Baldaŭ aperos : "Ĉu militista naciodefendo estas kredebla?" de Jean Lasserra (trad. Laval) - Sekvos : "La Turo de l'Popoloj" de Han Riner (trad. Valo) - "Por ekologia socio" de Murray Bookchin - "Esperanto en 24 paĝoj por katalunoj" kaj por 1984 : "La Jaro 2000" de Henri Muller (trad. Kotro kaj A.Naudé). Eble alvenos neatendite novaj manuskriptoj, sed pri tio vi ekscios per "Laŭte!" siatempe.
5. Eblas aboni por ricevi "aŭtomate" la novaĵojn kun 20%-rabato, ĝirante minimume 60-frankan provizon. La abonantoj de "Laŭte!" krome "aŭtomate" ĝuas 20%-rabaton por la "malnovaĵoj". Afranko inkluzivita, se la mendo superas 60 frankojn.
6. Atentu! Ĝus elĉerpiĝis : "La ingenia hidalgo Miguel Cervantes" kaj "Tra la mondo per biciklo". "Esperanto en 24 paginas" por hispanlingvanoj estas nun ofsete reeldonata ; nova prezo : 2,50 FF - specialaj prezoj kun afranko : 30 FF por 15 ekz-roj, 50 FF por 30 ekzempleroj.
7. De nun la broŝurservo ofsetumas, kio ebligas liveri iom pli belaspektajn presaĵojn kaj represi en pli bonaj kondiĉoj. Dankon al ĉiuj kunlaborantoj kaj mendantoj kaj abonantoj! Kaj ek al la 117a broŝurtitolo! Kribo.

* se <u>nenio</u> en ĝi : plu legu!	→	la tragika kvadrato
* se <u>baldaŭa abonfino</u> : la dato	→	fin
* se <u>abono jam finita</u> : ruĝa kruco	→	de via abono!